

Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44000 NANTES, Francujo

JARABONO

Jarabono : 60 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61 L

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

1986 - 2


(APRILO - MAJO - JUNIO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... la skulptita kaverno de Dénezé (2-a parto)



(Gravurajo de G. Doré)
... « Orfeo irinta Inferon » de J. Offenbach.

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangeul)	2
La skulptita kaverno (tr.F.Boyet)	3-4
Paĝo de la geknaboj (S.Pilger)	5
Valentin HAÜY I (S. Boniol)	6-7
Orfeo (I) (R. Watier)	8-9
Besta fabelo (L. Tihanyi)	10-11
Por via distro (C. Cavalié)	12
La vie de Grésillon	13-14
Nia konkurso (II)	15

El Grésillon

La printempo estas bonvena post terure longa vintro. Iom post iom malaperas la spuroj de la frostego kaj de la neĝo ne kutima, kaj la interno de la kastelo retrovas sian kutiman aspekton.

La Printempa Semajno kunigis du tre diferencajn aktivaĵojn. La Pedagogia Seminario, altnivela kun prof. Szerdahelyi, prof. Companys kaj aliaj prelegantoj ŝajne kontentigis la UFE-organizantojn kaj la ĉeestantojn. La kunvivanta dua grupo, gvidantoj, gepatroj kaj ĉefe infanoj, zorge laboris: kursoj, promenadoj, ludoj, redaktado de staĝ-gazeto, preparado kaj prezentado de la vesperaj klub-distraĵoj fare de la infanoj mem. Eĉ la malagrabla vetero ne sukcesis malkuraĝigi la ĉeestantaron. Espereble, venontjare, simila periodo ankoraŭ pli sukcesos.

Ĉiujare ni ŝatus aldoni novan servon por la komforto de la ĉeestantoj Ne ĉiam estas eble plenumi tian deziron. Sed, en 1986, dank'al grupo de junaj helpantoj la "butiko" translokiĝos al speciala ĉambro proksime al la kurso-ĉambroj. Tie oni pli facile, pli trankvile zorge rigardos la poŝtkartojn kaj aliaj aĉeteblaĵojn. En la sama ĉambro eblos ankaŭ aĉeti trinkaĵojn kaj glaciaĵojn, eĉ inter la kursoj. La enirhalo de la kastelo estos tiamaniere liberigita, kaj ne plu estos ĝeno por la servistaro, kiuj , dum la posttagmezo, ofte lasis sian laboron por alporti teon, kafon,..., kion ili tamen ĉiam faris afable. Ek de junio eblos trinki kafon inter la du partoj de la matenaj kursoj kaj regajni viglecon sidante en agrabla loko.

Jam fine de junio okazos kunveno de la komitato por prepari la programon de 1987. Verŝajne ŝanĝoj enŝoviĝos. La venonta numero de Kulturaj Kajeroj anoncos ilin.

ĈU VI PETIS la specialan programon pri la staĝo "INFORMADIKO per ESPERANTO" Ne forgesu, ke samtempe (10/23-de aŭgusto) okazos Esperanto-kursoj.

Esperanto tra la Mondo

NOVAĴOJ EL ĈINIO- La 71-a universala kongreso vigle preparîgas en Pekino. La ĉina poŝto eldonos porokazan koverton kun surpresita poŝtmarko. En Sanhajo dekunu gelaborantoj de la ĉina flugkompanio CAAC partoprenis 4-monatan esperantan kurson por deĵori dum la kongreso.

Por unuecigi la kriteriojn de instruado kaj ekzamenoj de fakultativaj esperanto-kursoj en ĉinaj altlernejoj, grupo da kompetentuloj kunvenis en Ĉjuanĝou. Post perfektigo, Esperanta Kurso" atendos aprobon de la "Komisiono por kompilo kaj kontrolo de altlernejaj fremdlingvaj instrumaterialoj".

Scienca kaj Teknika Esperanto-Asocio okazigos Internacian Akademian Konferencon en esperanto de la 22-a ĝis la 24-a de julio, ĝuste antaŭ la universala kongreso. Informas S-ino Wang Yuchun, Ĉina Akademio de Sciencoj, Fuxingmenwai Sanlihe, Beijing, Ĉinio.

Scienca filmo pri la komputila sistemo estis produktita interalie en esperanto kaj jam projekciita en sesio de Internacia Akademio de Sciencoj en San Marino.

JAM OKAZIS- En septembro renkontiĝis 80 diversfakaj kuracistoj kaj medicinistoj en Schwerin, en la nordo de G.D.R. por la tradicia Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco. La Universala Medicina Esperanto-Asocio havas delegitojn en 28 landoj.

Komence de lasta decembro, 37 fakuloj el 11 landoj partoprenis seminarion pri "Problemoj de la instruado de esperanto al plenkreskuloj" en la seminariejo de Esperanto-Asocio en Kulturligo de G.D.R., en Bad Saarow, ĉe Berlino.

Turisma Esperanto-Kalendaro publikigis por 1986 la liston de 367 internaciaj aranĝoj planitaj de la esperanto-organizoj.

BALDAŬ OKAZOS- La tradicia Pupteatra Internacia Festivalo okazos en Zagreb de la 23-a ĝis la 31-a de aŭgusto, kun esperanto-teatraĵoj dum la unuaj kvar tagoj. Informas: Internacia Kultura Servo, Amruševa 5, YU- 41000 Zagreb.

Akademio Internacia de la Sciencoj organizos en San Marino sian trian universitatan sesion en esperanto kaj kvar aliaj lingvoj, de la 31-de aŭgusto ĝis la 8-a de septembro. Informas: AIS Kleinenberger weg 16b, D-4790 Paderborn.

La jara internacia renkontiĝo de esperantistaj geinstruistoj de la "Freinet-movado" okazos en Challans (Vendée), Francio, de la 8-a ĝis la 18-a de julio. Informas: Paul Poisson, 239 rue Victor Hugo, F-37450 St Cyr sur Loire.

"Kultura Centro Esperantista", Pf.771, CH-2301 La Chaux de Fonds, preparis por 1986 riĉan programon de kursoj, seminarioj, ferioj, stud-semajnoj. Petu ekte la informojn.

Jam notu: la "Kvara Festivalo Kanzon-teatra" okazos en Parizo la 22-23-a de novembro 1986.

Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazos en Louvain la Neuve (Belgio) de la 12-a ĝis la 19-a de julio.

Se vi iros al la motor-hejma ralio de FICC en Hungario, kontaktu: J.G. Kuster, Paulinastrato 28, NL-7555 JW Hengelo.

Busvojaĝoj tra Eŭropo. Pluraj cirkvitoj en la jaro. Informas: Esperantotur-Benelukso, Schotlandstr. 73, B-1060 Bruselo.

NOVAJ ELDONAĴOJ- Komerca Ĉambro de la franca departemento Meuse eldonis sian luksan "Indekson de la Mozaj produktaĵoj" en 4 lingvoj: franca, angla, germana kaj esperanta. La ĝenerala direktoro, Sro Gilbert estas esperantisto.

Nova ĉina gazeto aperis: "Tutmondaj sciencoj kaj teknikoj". Kvaronjara aperigo. Novaĵoj kaj komentoj.

"Ĉu rakonti novele?", 6-a libro de la "Ĉu-serio" de J. Valano.

"Lingvaj aspektoj de esperanto", kolekto de eseoj de Bruno Migliorini.

"Computer dictionary esnglish-esperanto" de Ch. Bertin.3800 terminoj.

"De Pont-Aven al Varsovi'", nova kasedo de Ĵak Le Puil; kun teksto-libreto de dek kanzonoj.

"Angelo, tirano de Padovo" de V. Hugo, aktoj unua kaj dua. Speciala literatura numero de Franca Esperantisto. Sekvo de la interesa serio.

la skulptita kaverno(2)

Alia adepto de la kalsono estis Rabelezo. En lia abatejo de "Telem", kies devizo estis:" faru tion, kion vi deziras " la damoj harmonigis siajn kalsonojn al la koloro de la kuloto de la nobelo, kiun ili elektis. Sed malgraù tiuj apogoj, la papo Pio la 4-a dekretis, ke la kalsono estas eltrovo de la diablo, iu pekilo, kaj plie, ke ĝi estas kontraùhigiena. pri tiu lasta punkto, li sendube pravis. La tiamaj kalsonoj estis fiksitaj per ŝelketoj al la ŝultroj, kaj estis nek zipo nek elasto por movi tian subveston sub la larĝa robo kun virtogardanto. Konklude la kalsono estis malpermesata kun risko de ekskomuniko. Oni devos atendi dum unu jarcento, ĝis la epoko de Ludoviko la 14-a, por trovi solvon per la fenditaj kulotoj, kiujn la virinoj portis ĝis la komenco de la 20-a jarcento.


Konklude, ĉiuj tiuj elementoj ebligas al ni dati tiujn skulptaĵojn, kiuj datumas de la tempo de Katerina de Medicis, meze kaj fine de la 16-a jarcento. Sed la panelo la plej kurioza de la tuto estas tiu, kiun oni nomas "de la pieta". Efektive unuavide estas io, kio similas al kruco, kaj virino, maljunulo kaj infano tenas sur la genuoj sternanton. Tio pensigas pri la diversaj verkoj pri la dekrucigo de Kristo. Kiam oni deprenis la korpon de Kristo de sur la kruco, antaù la entombigo, oni ofte prezentis la Sanktan Virgulinon kaj aliajn personojn tenantajn la korpon de Kristo sur siaj genuoj. Sed kio ĉi tie ŝokas estas, ke la kruco estas hakilo. Aliflanke, la sternanto ne estas morta, ĉar li tenas la brakon de la virino kaj tiu virino estas stranga sankta virgulino, kies kruroj estas nudaj kaj kies kapvesto estas precize tiu de Katerina de Medicis inter 1559 kaj 1560. Tio montras al ni la daton sed ne la signifon de tiu sceno. Oni komprenis nenion ĝis la momento, kiam ni havis la bonŝancon trovi en la nacia biblioteko en Parizo kurioza dokumenton. Temas pri pamfleto, kiu titoliĝas "la vekhorloĝo de la Francoj", kaj kiu raportas pri evento, kiu okazis en decembro 1560, je la fino de la reĝado de Francisko la 2-a, tiu kompatinda reĝeto, kiu mortis malpli ol 16-jara. En tiu mallonga reĝado, la protestantoj provis puĉi: tion oni nomis la "komploto de Amboise". La celo de la komploto estis kapti la reĝon por poste proponi interŝanĝon: "se vi deziras rehavi la reĝon vivanta donu al ni la estron de la katolikoj kaj permesu la pr aktikon de nia kulto". Sed la komploto malsukcesis kaj la punpremo estis terura, ĉar en ses monatoj oni mortigis pli ol mil protestantojn. Oni pendumis ilin ĉe ĉiuj balkonoj de la urboj Blois kaj Amboise, kaj oni eĉ rakontas, ke pro manko de ŝnuro, oni pendumis ilin duope aù triope. Pri la nobeloj, laù la franca tradicio, oni devis senkapigi ilin per spado; sed, eble ĉar mankis lertaj ekzekutistoj, oni uzis hakilon. Post tiu teruriga subpremo, la papo, kiu nomiĝis Pio la 4-a, onklo de la reĝino Katerina, opiniis tiun ekzemplon bona, kaj li sendis al sia nevino valoran donacon. Temis pri desegno de Mik.el-Anĝelo, pli precize labordesegnaĵo por la skulptaĵo "Pieta" en la katedralo de Florenco, kie estis la familio Medicis. Sur tiu desegno oni vidis, meze, Jozefon el Arimatio, kun longa barbo, subtenanta iuflanke la Sanktan Virgulinon kaj aliflanke Sanktan Johanon, prezentitan kiel infanon; kaj tiuj tri personoj havis sur la genuoj la korpon de la mortinta Kristo. Tiu prezentaĵo estas tiu de la skulptita dekrucigo, sed Mikel-Anĝelo estis farinta plurajn provdesegnojn kaj inter tiuj estis la donaco al Katerina. Sed survoje la religiulo, kiu portis la donacon mortis pro pesto kaj donis la desegnaĵon al komercisto, kiu ĵuris, pere de Biblio, ke li portos tiun objekton ĝis la kortego de Franclando. Sed la komercisto estis protestanto kaj li montris la desegnon al siaj amikoj, kiuj decidis ŝanĝi ĝin laù sia gusto. Poste oni revolvis la tolaĵon, oni riparis la sigelojn ĉe la

papo, kaj. la komercisto plenumis sian promeson, liverante la donacon al la reĝino. Katerina, flatita pro tia donaco, invitis la kortegon, kaj post pompa bankedo oni decidis malvolvi la tolaĵon antaù ĉiuj. Tiam okazis la skandalo: la Sankta Virgulino estis nuda kaj kape similis al Katerina; je la loko de Jozefo de Arimatio oni povis rekoni la kardinalon "de Guise", estro de la katolikoj; kaj je la loko de Sankta Johano, infano, tie estis la juna reĝino de Franclando, Maria Stuart, nevino de la "Guisė-uloj", edzino de la kompatinda Francisko la 2-a, kiu kuŝis je la loko de Jesuo, sur la genuoj de la aliaj. En la angulo de la desegno la kruco estis anstataùigita de hakilo. Se kompari kun la nuntempaj desegnoj de la satiraj ĵurnaloj, tiu bildo estis multe pli ofendiga. Fakte oni atencis al sakrala temo de la religio kaj oni ŝanĝis ĝin en politikan karikaturon. Bedaùrinde por ni, la katolikestroj ne ŝatis humuron kaj ordonis ne nur tuj detrui la desegnon, sed krome ordonis la silenton al ĉiuj ĉeestantoj. Tamen iuj parolis kaj tion pruvas la pamfleto presita en Parizo.

Rimarkinde, la subskribo de tiu pamfleto estis:" Eusèbe philadelphie cosmopolite, tailleur de pierre libertaire". Post la individua nomo Eùzebo la sekvo estas tradukebla el la greka kaj poste la franca per tio:" amiko de la homoj de la tuta mondo, ŝtontajlisto liberecana". Ankaù ĉi tie , en Dénezé, laboris liberecanaj ŝtontajlistoj.

El dokumento

tradukita de Fernand BOYET



Saluton!

mi estas Silvia Pilger el Neder-
lando kaj mi estas 13 jara.
Tio ĉi estas la unua fojo en Gresillon
por mi.
Mi tre ŝatas esti ĉi tie.
Sed beclaŭrinde Baugé estas
tre malproksima de ni.
Hodiaŭ estis sufiĉe bela vetero.
kaj ni mangis fritojn kun hakita
bovaĵo.
Ni ludis per pilko, ĵus ekstere.
mi estas ĉi tie kun mia amikino
Karin ŝi estas komenccantino en
Esperanto.
Sinjorino Lloancy el Pau invitis
nun parke mi paru paroli pri
trafiko en lelystad.
mi logas en lelystad.
Do gis revido

Silvia '86

Valentin Haüy

1.a parto

Nuntempe preskaù ĉiuj aùdis pri Louis Braille kaj vidis en vortaro ties alfabeton, sed eble malmulte scias pri Valentin Haüy. Kaj tamen se ne estus li aginta proksimume 50 jarojn antaù Braille, ĉi lasta ne estus povinta plenumi sian decidan laboron. Nu, kiu estis tiu Haüy kaj kial la fondinto de la mond-konata Asocio Valentin Haüy en Parizo elektis lian nomon, eĉ mi diru: lian emblemon ? pro tio, ke Haüy estis, laù eltiraĵo el la broŝuro de Pierre Henri al li dediĉita:" la liberiginto de la blinduloj, la inventinto dé ilia leg- kaj skribsistemo, la fondinto de ilia unua lernejo, unuvorte ilia rehonoriginto pere de enlaborigado."

Valentin Haüy naskiĝis la 11-an de novembro 1745 en Saint-Just-en-Chaussée, duonvilaĝo, duonurbeto sude de la franca provinco Picardie. La patro estis modesta teksisto; ili tamen vivis en tegoltegmentita domo. La patrino, fruorfino, estis edukita en monaĥinejo staranta vidalvide al la familia domo kaj la baptopatrino de Valentin estis precize la abatino de tiu monaĥinejo. La baptopatro, siaflanke, reĝa konsilisto, kontrolis la bienojn kaj arbarojn. Sufiĉe bonstata kvankam neriĉa montriĝis la familio. Valentin havis fraton: René-Just, laùnome, 32 monatojn pliaĝan. (Tiu frato pastriĝos; kreos la sciencon kristalografio; membriĝos en Scienca Akademio nomumiĝos kanoniko en Notre Dame en Parizo; Kavaliro, poste Ofjciro en la Honorlegia Ordeno. Li redaktos traktaton pri fiziko; tamen tre modesta homo li dumvive restados).

En 1751, kiam Valentin estis 6-jara, la familio transloĝiĝis al Parizo por havi la eblecon pli bone eduki la filojn. Valentin, siaflanke, studos en pariza universitato. Kiaj estos liaj elektobjektoj? La latina, la greka, la hebrea kaj deko da vivantaj lingvoj. Li sin vivtenos per tradukado de diversaj dokumentoj, ĉu komercaj, ĉu privataj, ĉu notariaj. Li iĝos interpretisto de la reĝo, de la admiralitato, de la urbokonsilantaro, kaj membro de la Akademia Buroo de Skribsistemoj de Ludoviko la 16-a ĵus fondita. Ankaù fakulo pri deĉifrado de malnovaj manuskriptoj, ĉu francaj, ĉu fremdlingvaj (dum la revolucio li elkriptigos fremdlingvajn korespondaĵojn).

Pro tia gusto al la esprimrimedoj, li plejunue interesiĝas pri la surdmutuloj, poste pri la blinduloj; sed pri ĉi lastaj multe pli fundamente Laù li, tial, ke la blinduloj povas uzi la gepatran lingvon, leviĝas nur unu problemo: kiel ilin legigi? Li estas 40-jara, kiam li elpensas la solvon sub influo de ĉefe kvar cirkonstancoj:

1- Ni memoru la 18-an jarcentan sciavidon pri la blinduloj. interalie la faman demandon direktitan al la sensualisma filozofo Locke: " Ĉu denaska blindulo ĵus akirinte la vidpovon post operacio kapablus distingi sferon disde kubo ?" Kaj ankaù la faman verkon de Diderot (1749) sub titolo:" Letero pri la blinduloj por tiuj, kiuj havas la vidpovon." (Denove en 1782 la sama aùtoro, sub titolo "fenomenoj" proponas aliajn rimarkojn pri la blinduloj;

2- Ni admiru la deziron plenumi por la blinduloj, ne la saman, sed similan taskon al tiu de Abbé de l'Epée favore al la surdmutuloj. Por tiuj malfeliĉuloj li elpensis alfabeton kaj fondis la unuan lernejon (1760). Al la blinduloj Haüy ne donos alfabeton, sed la eblecon legi kaj skribi kaj fondos por ili la unuan lernejon;

3- Gravas la iniciato de la ĵus fondita Filantropa Societo, kiu intencas starigi ŝpinlaborejon por duon-dekduo da blinduloj. Antaù du jarcentoj estis ja avangardisma ideo enlaborigi blindulojn en ŝpinlaborejo, ĉar tiam ili estis plejparte nur almozpetantoj; eĉ ilin oni uzis por amuzi la publikon. Oni ne hontis ilin elmontradi en foiroj samtempe, kiel ursoj kaj simioj;

4- Notindas la ĉeesto en Parizo printempe de 1784, de la juna fama

kantistino Marie-Thérèse von Paradis, blindulino, kiu ludas ĉe la kortego. Si posedas apartan presmaterialon por korespondi kun viduloj kaj reliefajn mapojn.

Sed la ververa profunda instigilo de Valentin Haüy estas multe pli kora ol intelekta. Li rakontas pri sia indignemo, kiam li vidis sur la tiama placo Ludoviko la 15-a (nuntempe Konkordo Placo) malŝatindan spektaklon en foiro Saint-Ovide. Lerta fiulo senskrupule venigis tien, en kafejon, dekon da loĝantoj el la maljunulejo Quinze-Vingts, groteske vestitaj, kun la okuloj maskitaj de dikegaj okul-vitroj. Ili aspektis despli ridindaj, ke ili tenis kandelojn. Misharmonian simfonion ili ludis, kio ŝajne ĝojigis kaj ridigis la ĉeestantojn. Kaj Haüy skribas jene:" Sento tute mala ekkaptis mian animon kaj tuj mi elpensis la eblecon doni al ili la verajn rimedojn, kies uzon nur ŝajnan kaj ridindan ili havis."

Haüy rimarkas, ke la blinduloj rekonas la objektojn laŭforme kaj ne eraras pri la moneroj ricevitaj de ili. Kial do ili ne povus distingi la noton do disde la noton re, aŭ la literon a disde la litero b, se oni sukcesus doni al ili taŭgan rimedon ? Printempe de 1784, li eksperimentas kun sia unua lernanto la juna almozpetanto François Lesueur, kiun li renkontis ĉeporde en Saint Germain-des-Prés preĝejo. Jen anekdoto pri tiu renkontiĝo: doninte al tiu junulo moneron, Haüy tute mirigite aŭdas strangan respondon:" Dankon, Sinjoro. Certe soldon vi intencis doni al mi, sed fakte eskudon vi donis." El tio Haüy konkludas pri tute taŭga palpokapablo ĉe blinduloj. Ciutage li instruadas la junulon kaj (eble laŭlegende) plenigas lian monujon por kompensi la enspezan mankon dum la instruhoroj.

La ĉefideo de Haüy estas legigi la blindulojn. Tial li fabrikigas apartajn presliterojn, ĉar la kutime uzataj estas multe tro malaltaj, por ke la fingro povu ilin palpe distingi. Per tia materialo Lesueur lernas leg- kaj skribarton, studas ortografion, kalkulas dank'al ciferoj en fakoj ordigitaj. Li estas eklern-inta en la tago de Pentekosto kaj tiel fulmrapide progresinta, ke la 18-an de novembro samjara li plenumas demonstradon ĉe la Akademia Buroo de Skribsistemoj. Tie li publike legas, skribas, kalkulas, rekonas la landojn kaj figurojn sur mapo kuŝantajn. Tiuj mapoj estis el gladpresita kartonpapero.

En januaro 1785 Haüy estis nomumita membro de la Filantropa Societo kaj de ĝi komisiita por instruado de 12 blinduloj. Sed lia loĝejo iĝas tro malgranda. Proprakoste li luprenas alian. Post unu jaro, pro plialtiĝo de la lernantaro, la Filantropa Societo kunigas sur la sama loko, sed sur alia strato, ambaŭ lernejon kaj laborejon. Ekestas do la unua blindullernejo. En la pasinteco kelkaj blinduloj tamen klerigis, sed ili estis nur unuopuloj de la sorto favorataj. La originaleco de Haüy kuŝas en tio, ke li fondas lernejon, kie la unuan fojon ĉiuj ajn, ĉu knaboj, ĉu knabinoj el ĉiuspecaj socitavoloj rajtas ricevi instruadon; kaj plie: senpagan instruadon. Cetere kroma originaleco kuŝas en la gladpresado de papero per jam fanditaj presliteroj por havigi al la blinduloj literojn kaj ciferojn taŭgajn por la palposenso Kaj elstare ambicia montriĝas Haüy, kiu volas ilin provizi, ne per unuekzempleraj sed per multekzempleraj libroj, tiel, ke ĉiu havu sian propran bibliotekon. Tiucele li konstruigas presmaŝinon konvenan por reliefa presado kaj aldonas sistemon por nigrigi la reliefajn signojn, por ke ambaŭ blinduloj kaj viduloj uzu la samajn, ĉar li revadas pri instruado de vidantaj infanoj fare de la blinduloj. La lernantoj de Haüy scipovas presi, kaj presado konsistigas parton de ilia laboro.

Kial do oni rezignis pri tiaj geniaj ideoj, pri sistemo, kiu tiel facile ebligis la interrilatojn? Car la ordinaraj literoj ne estas fingrotaŭgaj. Ni konsciu ke sinteza estas la vidkapablo dum analiza estas la palposenso.Granda tempoperdo.

S. BONIOL

ORFEO IRINTA INFERON

(1.a parto)

Dum la 19-a jarcento brilis plej elstaraj komponistoj kun gravtemaj dramaj operoj: BIZET, GOUNOD, MEYERBER, ROSSINI, VERDI, WAGNER,k.t.p. skribis muzikon de teatraĵoj ankoraŭ nun famaj. Sed apude floris pli popola muzika speco, bagatela aŭ burleska rakonto, mikso de komedio kun kantoj, kiujn oni nomis "operetoj". Multaj el ili nun perdiĝis en forgeso sed muzikaj scenejoj daŭre konservas repertuaron el plej lertaj komponistoj: Johano STRAUSS, Frantz LEHAR pri vienaj operetoj, AUDRAN, ADAM, HERVE, LECOCQ en Francio, kun aparta distingo al Jakobo OFFENBACH, kiu, kune kun helpantoj CREMIEUX, MEILHAC, HALEVY verkis ĉirkaŭ cent operetojn inter la jaroj 1839 kaj 1880. Post enscenigo de 34 burleskaj muzikaj teatraĵoj de pli malpli valoraj partituroj venis sur scenojn de Parizo la verko konsiderinda, kiel angula ŝtono de la Offenbaĥa muzika genio:" Orfeo irinta Inferon ". Kial tia petolema stilo de muziko povis akordiĝi kun la malgaja temo de grekmitologia Orfeo ?

Ni nun havos apartan konsideron pri Mitologio, kiu post jarmilo da forgeso, ĉefe pro okcidenta religia premado, reekfloris en la Renesanco, kiel inspirfonto pri skulptaĵoj, pentraĵoj kaj muzikaĵoj. Tia, kia ni ĝin konas en pluraj jarcentoj antaŭ Kristo, la Mitologio, samtempe religio pri misteroj kaj potenco de naturaj fortoj kaj artema sento, fontas tre malproksime en la eterna tempo ĝis Indujo kaj sanskritaj legendoj. La nocio de Infero, rifuĝejo por la animoj de mortintoj, estas trovebla ĉe pluraj prareligioj. En la Greka, Jupitero naskis, kun diino Mnemosino, naŭ Muzojn el kiuj Kaliopa, la Muzo de heroa poezio. Orfeo estis naskita de Apolono kun Kaliopa, kiel simbolo de la ĝuo donita de muziko al popolo. Antikvaj skulptaĵoj montras Orfeon ludantan per liro, muzikilo en primitiva formo de nia konata harpo. Laŭ la legendo, Orfeo ne nur kapablis pri muziko, sed ankaŭ estis heroo partopreninta al vojaĝo de Argonaŭtoj. Li eksentis egan ĉagrenon , kiam tuj post lia edziĝo lia edzino Eŭridica estis venenigita de serpento kaj mortis. La brava Orfeo tiam decidis, spite al multaj danĝeroj, iri ĝis Infero por peti de la Inferestro, Plutono, la redonon de la edzina animo. Kortuŝite pro la beleco de la muziko Orfea, Plutono konsentis pri la reveno de Eŭridica, kondiĉe ke sur la revena vojo Orfeo iru antaŭen, ne sin deturnante por admiri la vizaĝon de l'edzino. Sed li forgesis la promeson kaj la edzino estis poreterne perdita. Orfeo estis tiom ĉagrenita, ke li ne plu povis rigardi aliajn virinojn. Pro kolero la Baĥantinoj ŝiris lian korpon.

La legendo de Orfeo plurfoje vekis la atenton de artistoj por muziko aŭ skulptarto. Germana komponisto GLUCK (1714-1787) verkis, inter aliaj, operon "ORFEO", el kiu restas tre konata malgaja ario " Mi perdis Eŭridican mian". Sed venas nun por ni la momento montri, kial Jakobo Offenbach elektis Orfeon, kiel temon de ĝojiga opero kaj pro kio tiu teatraĵo fariĝis senĉesa sukceso ĉe la publiko. Tio estis ek de la mezo de la 19-a jarcento, pli precize de la tempo, kiam regis en Francio Napoleono la 3-a, la nepo de la fama Napoleono la 1-a

Jakobo Offenbach - nomo poste francigita al Jacques (Ĵak) Offenbach estis de tre modesta deveno. Lia patro Isaac Eberst, profesia muzikisto, estis pli konata sub la nomo Offenbach, ne granda germana urbo, kie li naskiĝis. Li loĝis de 1816 en Kolonjo, kreinte tie familion, kie la muziko estis la panprovizilo. Por doni al siaj du filoj, Julio kaj Jakobo, bonan muzikan karieron, la patro opiniis, ke taŭgas nur Parizo, kien ili veturis. Tiam Jakobo 13-jara, kiu jam ludis tre bone per violonĉelo, ekspertis, kun sia frato, tre mizeran vivkondiĉon. Sed bonega ŝanco estis, ke la severa kaj famkonata sinjoro Salvatore Cherubini, muzikkomponisto, direktoro de la Muzikkonservatorio konsentis

akcepti la junan Jakobon, kiel lernanton pri Harmoni-scienco. Dum tiu jaro 1833 la junulo devis ankaù lerni la francan lingvon, kiun li bone akiris tamen kun neforvišebla germana tono, tio je la simpatia amuzo de liaj francaj amikoj. Sinsekvis por Jakobo dek jaroj da vivetaĉo, kiel muzikmetiisto ĉe orkestro de la Komedi-Opero en Parizo, tamen kun la konatiĝo de la tiamaj granduloj en lia arto, nome Von Flotow, Fromenthal, Halevy, Hertz. Jam famigite de la eldono de tri valsoj Offenbach estis invitita ĉe la Brita Kortego en Londono kun sukcesplena akcepto. Je lia reveno, estante 25-jara, li edziĝis kaj tio estis sendube lia dua bona ŝanco, ĉar la edzino, la bona Hermina, fidela kaj zorgema, dum la tuta vivo mastrumadis por sia fantaziega edzo kaj donis al li en la sekvo de la jaroj, kvin infanojn. Ho jes ! Fantaziega viro, longulo malgrasa, malŝparema sed bonkora kaj sentema. Farsulo, ŝercemulo li estis sed samtempe havante konstante en la kapo notojn por komponi komikajn refrenojn aù ĉarmajn melodiojn.

Kaj Orfeo ? La privata vivo de Offenbach havis nenion kompareblan kun la legendo greka. Eĉ la fidela Hermina lin postvivis en 1880. Sed ni konsideru la tiutempan francan historion kaj la karieron de la muzikisto, kiu tute ne iris glate. Malgraù plej forta deziro pri siaj verkaĵoj, li ne trovis malfermitaj la pordojn de la Komedi-Opero de Parizo, ĉefe pro la kontraùstaro de la serioza komponisto Meyerber. Okazis la franca Revolucio en la jaro 1848, malkvieta epoko ne favora por teatraĵoj kaj ofte la monujo estis malplena ĉe familio Offenbach. Provizora savo estiĝis dank'al posteno de muzikestro ĉe la pariza Nacia Komedio, tio ĝis 1851, kiam la respublikistoj estis venkitaj per baloto favora al la princo Ludoviko-Napoleono, fariĝonta Imperiestro. Okaze de granda ekspozicio en 1855 Offenbach trovis solvon por sia plej kara deziro: estri teatron por siaj komedioj. La unua scenejo estis tre modesta, pli ĝuste barako, sed rapide plenigita de l'publiko ŝatanta la burleskaĵojn. Offenbach nomis sian teatron: Bouffes Parisiens (Bufonaĵoj Parizaj). Tamen, spite al sukceso, la financoj ne pliboniĝis kaj Offenbach komprenis ke nur tre daùra sukceso en granda teatro de burleskaĵo famkonata alportos firmecon al lia verkaro.

En tiu duono de la 19-a jarcento komerco kaj industrio ekfloris. Kvankam mizero ankoraù frapis la laboristaron, burĝoj kaj iamaj nobeloj pliriĉiĝis. Arkitekto Haussman rekonstruis belajn kvartalojn de Parizo; oni komencis konstrui la Grandan Nacian Operejon; la kortego de la Imperiestro lukse brilis, en la salonegoj svarmis homoj frivolaj kaj facilanimaj. Oni volis danci kaj ridi. Sed ankoraù en tiu epoko estis danĝere pro cenzuro de l'regno moki la tiaman socieron. Preferinde, oni priridu la antikvajn grekajn diojn: ili ne plendos pro malrespekto.

(sekvo en venonta numero)

René Watier

RIDU kun NI!

Iu viro vizitas bird-vendejon. Li deziras aĉeti papagon por sia edzino. Li demandas la vendiston:

- Kiom kostas tiu ĉi, sinjoro?
- Dumil frankojn ĉar li estas dulingva.
- Bone. Kaj la ruĝa, tie ?
- Li estas trilingva kaj kapablas tajpi. La prezo estas kvarmil frankojn.
- Bonege. Kaj tiu, kiu sidas sur la alta stango ?
- Li kostas okmil frankojn. Mi ne scias, kion li kapablas fari sed la aliaj du nomas lin "estro".

KAPRO-KONFERENCO

Foje okazis... Kie okazis ?... Kie ne okazis ?...

Ekzistis iufoje bela, florriĉa, arbara insulo meze de la granda Atlantika Oceano. Okazis, en la 15-a jarcento, ke ŝipistoj portugalaj ripozis ĉe bordo de tiu neloĝata insulo. Dum maristoj plenigi barelojn je freŝa akvo de la rivereto, ĉasistoj serĉis iun sovaĝan beston, ĉar ili jam satiĝis de la ĉiutaga, sekigita, salita bovaĵo, kiun la ŝipkuiristo pretigis al ili dum la longaj monatoj de la mara vojaĝo. Sed vane ili serĉis iun freŝan viandon. Eĉ mara birdo estis rara ĉe tiu insulo. La maristoj decidis helpi al la naturo, kaj sekvantan fojon, ili kunportis gekaprojn sur la insulon kun la espero, ke rapide ĉiuj maristoj tie haltantaj trovos sufiĉe da freŝa viando, ĉar la kaproj estas inter la plej multreproduktantaj bestoj. La kaproj plimultiĝis, sed la maristoj ne plu venis, ĉar ili esploris pli bonajn vojojn kun pli favoraj ventoj, kiuj rapide flugigis iliajn velŝipojn, orienten al la spic-landoj.

Dumtempe la kapraro paŝtiĝas metode kaj funde. Gi ĉirkaŭmaĉas la kruston de l'arboj, kiuj rapide senakviĝas kaj pereas, manĝas ĉiujn arbetojn kaj arbustojn. Restas nur herboj, herbaĉoj, plivole restus se la zorgemaj kaproj ne vorus ĉiujn novkreskantajn verdajn plantidojn, kiuj elŝoviĝas el la grundo! Venis la tempo, kiam la kaprosocieto malsate kaj nervozeme ekkonis:" Baldaŭ venos malsat-mizero, poste morto!". Tiam la maljunaj kaproj invitis la tutan socieron ariĝi en la Valo de la Kunsidoj. Konferenco formiĝis, kiu laŭregule elektis prezidanton kaj sekretarion. Prezidanto-Kapro petis Saĝulo-Kapron konatigi la situacion.

Saĝulo-Kapro rakontis, ke laŭ la legendoj, stultaj homoj kunportis el la Granda Tero sur tiun-ĉi Malgranda Teron, tra la Granda Akvo, kaprogenton. Se la homoj ne estus farintaj tian sensencan kruelan agon ĉiuj kaproj daŭre paŝtiĝus ĝoje kaj senzorge sur la Granda Tero.

Tro Scienculo-Kapro ofte perturbis per sia ekscitita blekado la raporton de Saĝulo-Kapro. Finfine Prezidanto-Kapro permesis al li paroli." Estimataj konferencanoj", ekdiris Tro-Scienculo-Kapro." Tiu, kiu parolis antaŭ mi sin nomis saĝulo, sed li ĉion intermiksis en sia malpreciza rakonto. Kiel diris la pasintjare mortinta granda mamulo nia, la fama Melk-Blekulo, krome, kiel pruvis la esploroj de pluaj famkonataj historiistoj kaj fakuloj, kadre de mamula genealogio ni estas Iberaj idoj de la "Kaprus Irkus...."
"Silentaĉu!" ekkriis la juna forta Fripona-Kapro." Tio, kion diris Saĝulo-Kapro almenaŭ havis sencon, sed kiu komprenas viajn konfuzajn idiotaĵojn ?" La interblekado de Fripono-Kapro havis bruan sukceson inter la junaj kaproj. Prezidanto-Kapro forprenis la orator-rajton de Tro-Scienculo-Kapro, kaj petis Saĝulo-Kapron fari proponon por malhelpi la minacantan malsat-mizeron. Pesimisma-Kapro:" La tuta konferenco restas senespera operacio, ĉar ĝi venas tro malfrue. Gi devus esti okazigita antaŭ pluraj jaroj. Post nur kelkaj semajnoj, certe ni ĉiuj pereos pro malsato!"
Divenisto-Kapro ekklamis:" Eraro! La grundo de nia insulo havas ankoraŭ grandajn biologiajn fortojn!"
Prezidanto-Kapro:" Mi petas silenton! Saĝulo-Kapro parolu!"
Saĝulo-Kapro bone konis la kontrastojn, kiuj oponas kaj frakciigas la insulan kapro-socieron. Pro tio, unue ĝi konsilis tion, kion espereble ĉiu kapro akceptos:" Mi proponas, ke la konferenco kondamnu la homan stultecon, kiu enkondukis tiun-ĉi krizan situacion per la nepripensita transporto de niaj praŭloj ĉi tien". La kaproj unuvoĉe akceptis la proponon. Ili kodigis la rezolucion. Prezidanto-Kapro ekvidis, ke la pli sendisciplinaj kaproj komencas fuĝi al la Fonto-Valo. Kiam ĝi vidis tion ankaŭ ĝia propra stomako komencis murmuri pro malsato:" Ĉi tiuj friponoj, indiferentaj je niaj problemoj, manĝegos la freŝajn verdaĵojn ĝis finiĝos la konferenco!" pensis ĝi, kaj rapide ĝi prokrastigis la kunsidon ĝis la sekvonta mateno. La kunvenantoj, kun brua blekado forkuris rekten al la kampoj.

Tro-Scienculo-Kapro kolere blekadis. El ĝia ŝaŭma buŝo flugadis senlogikaj frazoj:"...La plej akra kontraŭdiro de la konsumantaj societoj estas la malriĉiĝo de multaj estuloj de tutaj klasoj..." Nur la etaj kapridoj observis ĝin ridaĉe, la plenkreskaj kaproj tute ne konsideris ĝin. Venontan matenon, la malsatanta kapro-societo senmanke ariĝis en la Valo de la Kunsidoj. Multaj sciis, multaj sentis, ke pasintmatene Pesimista Kapro diris veron, ke konferenco estas sensenca. Tamen la timo pri certa pereo emis ilin neracie esperadi kaj nepre partopreni en la kunveno.
Sekretario-Kapro malfermis la kunsidon ĝi taksis la antaŭtagan rezolucion kaj esperis novan, bonrezultan decidon. Maljuna-Kapro anoncis: "Ni povas eviti tromultiĝon kaj la certan pereon de nia anaro nur se la junaj virkaproj kaj la inoj abstinados de kopulacio. Ni devus gardi sur malsamaj paŝtejoj, aparte la trupon de la inoj, sub kontrolo de maljunaj inoj, kaj aparte la trupon de virkaproj sub kontrolo de maljunuloj." La Juna-Flava-Barbo kolere ekkriis:"Neniam mi rezignos pri perdo de reprodukt-rajto. Ankaŭ Maljuna-Kapro ne tiel pensis, kiam ĝi estis juna. La junularo unuanime aplaŭdis la interkrion de Flava-Barbo. Maljuna-Kapro respondis: "Neniu devas perdi la esperon, ke foje ankaŭ li havos rajton kopulacii. Ni organizu, po unufoje jare, apartajn ĝeneralajn kur-konkursojn, unu por la virkaproj, alia por la inoj. La tri vir-kaproj la unue alvenantaj havus la rajton kopulacii kun la tri gajnantaj inoj. Tiamaniere estus eliminota la danĝero de troa multiplikado, kaj la plej bonaj kurantoj heridigus siajn kvalitojn al posteuloj." Fripona-Kapro interblekadis:" La vivo ne konsistas nur el kuro. Mi proponas decidi la unuiĝon per interbatado. En la naturo la rajto pri kopulacio apartenas al la plej bonaj interbatalantoj." Rapida-Kapro:"La interbatado elĉenigas la plej fiajn instinktojn. Post kelkaj generacioj, la kapraro brutiĝus, malsamiĝus. Mi balotas por la kurado!" Pedagoga-Kapro:"Mi proponas stud-konkurson. Havu la rajton kopulacii nur la kaproj, kiuj scias plej precize, plej rapide kalkuli." Flava-Barbo:"Ni interesiĝas pri herbo, ne pri kalkuloj. Ni malsatas!" Amema-Kapro:"Mi malaprobos iun ajn abstinadon. Ni ne subpremos niajn naturajn instinktojn. Miaj junaj amikoj, ne kredu al maljunuloj. Baldaŭ venos granda pluvo kaj poste ĉiuj plantoj reverdiĝos."
Profeto-Kapro:"Sola, mi konas la estonton. Mi vidas skeletojn sur kalvaj rokoj,...mi vidas la morton!". Fripono-Kapro:"Vi estas tute blinda!". Tro-Scienculo-Kapro:"La scienco donu solvon. Ni devus disdividi la insulon en du partoj, forte gardi la limon inter la du por ke gekaproj povu, alterne paŝtiĝi sur unu flanko ĝis la alia reverdiĝos".
Saĝulo-Kapro:"Ĝis reverdiĝos la malpermesata flanko, ni jam estos mortintaj pro malsato sur la alia!"
En la frakciita kapro-societo la interesoj kaj koleregoj malhelpis iujn proponojn akcepti. Maljuna-Kapro petis voĉ-rajton:"La homoj fabelas pri ni, rakontante, ke foje du kaproj renkontiĝis meze de mallarĝa ponto super iu altiĝinta rivero. Ambaŭ sciis, ke se unu el ili retroirus kaj lasus la alian pasi, poste ankaŭ ĝi libere trairus. Sed, stulte, ili komencis bataladi ĝis ambaŭ falis en la riveron kaj dronis kune." Tro-Scienculo-Kapro:"Ambaŭ estus devigintaj samtempe retroiri..." Maljuna-Kapro:" Ambaŭ retroiri? Tio estas malserioza revo. Se ambaŭ retroirus, kiel ĉiu povus sekvi la elektitan vojon? Tiu konferenco kulpas pro la fakto, ke partoprenantoj interkonsentas pri nur iu punkto, kiu tute ne solvas la komunajn problem-ojn. La membroj de la konferenco similas al du kaproj super la rivero." Prezidanto-Kapro denove prokrastis la konferencon.


Epilogo de la aŭtoro:

Mi legis la bazon de tiu-ĉi historieto en iu malnova libro. La lasta paĝo de la libro mankis.... do, mi ne scias ĉu la kongreso sukcesis malhelpi la katastrofon, aŭ ne ?

L. Tihanyi

POR VIA DISTRO

NOVA ENIGMO



SOLVO DE LA KRUCVORTA ENIGMO

Horizontale: martelo, malsata, ostro, truto, adori, ardeo, okulumi, orienta, cikonio, redakti, pilko, kreto, morti, kirli, imposto, imperio.

Vertikale: mantelo, torto, observi, mirtelo, surda, antikva, bulko, pugno, birdo, unika, cirkuli, oficiro, rikolti, insigno, atomo, nokte.

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Assemblée Générale - 5 avril 1986-

Monsieur Bodereau, président de séance, donne la parole au président de la MCE qui constate que 283 membres sont présents ou représentés. L'Assemblée Générale peut donc valablement délibérer. Il annonce le décès récent de M. Paul Guillot, ami de longue date et conseiller technique et l'Assemblée s'associe au message de condoléances adressé au nom du Conseil d'Administration.

Le rapport financier est présenté par le trésorier, D. Babin. Les disponibilités ont augmenté, en partie grâce à l'emprunt fait pour les gros travaux de juin et qui n'a pas été totalement utilisé. Ces travaux ont constitué l'essentiel des investissements. Une partie des disponibilités a été consacrée à des "fonds communs de placement" dont le rapport actuel est de 10 à 11% net. Certains prêteurs, au titre de l'installation du service d'eau, ont transformé en don le reliquat de leur prêt. L'Assemblée Générale les en remercient.

Les recettes "séjours" sont en augmentation de 16% les tarifs ayant été sérieusement pour 1985. Le chapitre inscription est également en hausse, mais les recettes annexes sont en baisse. De leur côté les dépenses ont diminué de 11% car l'approvisionnement direct dans un grand magasin local est plus avantageux et les prix des denrées alimentaires ont très peu augmenté. Les salaires ont subi une hausse de 4% et les charges sociales ont augmenté en proportion. Le chapitre "eau, gaz, electricité" est en hausse surtout à cause de la première facture de consommation d'eau. L'achat de deux "kits" pour le photocopieur a augmenté les frais de gestion mais a permis des économies sur d'autres chapitres (voir "publicité). L'excédent "compte séjour" est supérieur à celui de 1984 mais celui du compte "souvenirs, librairie" est sensiblement le même. L'excédent du "compte exploitation" a fortement augmenté grâce, en grande partie, à la forte progression des dons.

Les commissaires aux comptes ayant, après contrôle des documents comptables, donné quitus au trésorier, le rapport financier est adopté à l'unanimité. Les commissaires aux comptes, MM. Cortès et Lafargue, sont reconduits dans leurs fonctions pour un an.

Les résolutions "capital social" font apparaitre que 16 parts de sociétaires ont été transformées en dons. L'inscription de 24 nouveaux sociétaires et la souscription de 27 parts par d'anciens sociétaires portent la capital social à 154.500 francs. Le nombre de sociétaires passe à 582 dont certains ont "disparu".

Le rapport d'activité constate une légère baisse de fréquentation au 2ème stage de juillet. Il semble d'autre part que les stagiaires séjournent moins longtemps, en moyenne deux semaines. Il faudra en tenir compte pour la planification des stages. Le rapport est adopté à l'unanimité.

M. Watier demande quel est l'impact de Kulturaj Kajeroj dans le monde. Il ne peut pas être donné de réponse précise. Le revue est envoyée dans 27 pays. D'autres revues citent certains articles parus ou demandent l'autorisation de les publier. Le nombre des abonnés reste sensiblement le même.

D. Babin présente un projet élaboré par certains jeunes attachés à la MCE, qui se proposent de prendre en charge certains secteurs de responsabilité. Yannick Le Magadure présentera un projet d'affiche et de dépliant dont la réalisation

dépendra du coût et des possibilités financières du moment. Pascale Babin propose de transformer l'entrée du château en hall d'accueil et d'information, la vente des souvenirs devant être transférée dans une dépendance, lieu de rencontre et de détente où serait assuré le service des boissons. D. Babin lance un appel aux bonnes volontés pour un stage de travail à la Pentecôte. L'Assemblée Générale autorise la Conseil d'Administration à suivre favorablement ces projets.

Une discussion s'engage au sujet des difficultés rencontrées par les organisateurs pour le recrutement de responsables de cours, bénévoles. Il semble financièrement impossible d'assurer une rémunération mais les frais de voyage pourraient être, au moins en partie, remboursés. Henri Boyet, chargé de la recherche des responsables, pense que cette disposition permettrait de faire venir de l'étranger des professeurs qui pourraient former des responsables pour les années à venir. Le Conseil d'Administration prendra des décisions dans ce domaine.

Le résultat du vote pour le renouvellement d'une moitié du Conseil d'Administration est le suivant: nombre de votants: 258. Sont réélus: D. Babin, P. Babin, H. Boyet (258 v.), P. Chevalier (255 v.), B. Cheverry, G. Lagrange (257 v.). M.T. Lloancy, qui ne s'était pas présentée, s'est vu attribuer une voix.

La séance est levée à 18h.30.

Le secrétaire: Guy Dairon

****

Generala Jara Kunveno- 5/4/1986

S-ro Bodereau prezidas la kunvenon. P. Babin anoncas, ke 283 membroj ĉeestas aŭ sendis mandaton. Li anoncas la forpason de Paul Guillot, teknika konsilanto de la Kulturdomo jam de la unuaj jaroj.

La financa raporto prezentita de D. Babin montras, ke la kvanto da disponebla mono estas pli granda ol pasintjare parte pro ne kompleta uzado de la sumo depruntita por la gravaj laboroj de lasta junio. La disponebla mono estas grandparte deponita en banko kaj alportas procenton. Pluraj amikoj ŝanĝis sian alpruntitan monon en donacon. Ili ricevas dankojn.

Pro altigo de la tarifoj en 1985 la ĉapitro "restad-enspezoj" montras kreskon. Male la "nutraĵ-elpezoj" malkreskis pro pli favoraj aĉetoj ĉe granda magazeno kaj bremsado de la ĝenerala altiĝo de la prezoj. Salajroj kaj impostoj kreskis normale. La pli grandaj elspezoj pri "administrado" (aĉeto de papero, prizorgado de la fotokopiilo) trovas kompenson en la malaltiĝo de la ĉapitro "reklamado". La flankaj elspezoj preskaŭ ne ŝanĝiĝis. La socia kapitalo kreskis ĝis 154 500 frankoj kaj ankaŭ la nombro da membroj (582); Sajnas, ke la ĉeestantoj pli kaj pli preferas dusemajnajn restadojn al la kutima trisemajna.

Al demando pri Kulturaj Kajeroj la prezidanto respondas, ke ĝi estas sendita al 27 landoj kaj ke kelkaj artikoloj estas cititaj, eĉ publikigitaj en aliaj revuoj.

Grupo de gejunuloj faros proponojn. Y. Le Magadure prezentos projekton pri eldono de afiŝoj kaj reklamfolioj. Pascale Babin zorgos pri instalado, en speciala ĉambro, de agrabla loko por ripozo inter la kursoj kaj aĉetado de trinkaĵoj, poŝtkartoj.. Henri Boyet, kiu zorgas pri la varbado de gvidantoj por la someraj kursoj, proponas, ke krom senpaga restado la kursgvidantoj ricevus repagon, almenaŭ partan, de siaj vojaĝelspezoj. La propono estas akceptita kaj la komitato zorgos pri la financa flanko.

La ses kandidatoj (el kiuj nur unu nova!) al la Komitato estis elektitaj.

G. Dairon

****

Paul GUILLOT, edzo de Simone Guillot, zorgantino pri niaj korespondaj kursoj, patro de Jean-Paul, kiu longtempe helpis nin, mortis. Kulturaj Kajeroj profunde amike kondolencas la tutan familion.

****

Benedicte kaj Philippe Mouchet, Luce kaj Pierre Babin ĝojas informi siajn amikojn, ke naskiĝis CHLOE, ilia filino kaj nepino.

NIA KONKURSO

En ĉiu el la 4 numeroj de la revuo, en 1986 estas proponitaj diversaj enigmoj, ludoj kaj demandoj, kiuj konsistigas konkurson. La premioj, de 50 ff. ĝis 1 000 ff., kies listo aperis en la antaŭa numero de la revuo, estos disdonitaj en marto 1987. Vi rajtas sendi la respondojn al ĉiu el la 4 serioj aparte aŭ sendi la tuton samtempe ĉe la fino, antaŭ la 15-a de februaro 1987. Ne gravas ĉu vi kapablas respondi ĉiujn demandojn. Tamen partoprenu ĉar verŝajne ne multaj konkursantoj rajtos ricevi la maksimumon da poentoj.





DUA SERIO

1 — Jen la titoloj de 5 konataj verkoj. Denove vi devas trovi la mankantajn vokalojn por kompletigi la tekstojn de tiuj titoloj. Trovu ankaŭ la nomojn de la verkintoj :

TRGRŜ RMN

HMJ SR L TR

VV KJ PNJ D MJSTR MSD

FBLJ D L VRD PG

VRN Ĉ L LNDLM

2 — Demandoj ; la respondojn vi povas trovi en tiu ĉi numero de Kulturaj Kajeroj :

— Kiuj ĉarmaj bestoj kapablas senarbigi terenon ?

— En kiuj cirkonstancoj Valentin Haüy konkludis pri la taŭgeco de palpokapablo ĉe blinduloj ?

— Kio okazis kiam Valentin estis 6-jara ?

— Kial papo Pio la 4-a donacis al Katerina de Medicis labordesegnajon de Mikel-Anĝelo ?

— Kial Orfeo iris ĝis Infero ?

3 — Tiu karikaturo aperis en 1955, en revuo, kiu nun ne plu ekzistas :

— Kiun faman esperantiston ĝi prezentas ?

— En kiu jaro li naskiĝis ; en kiu jaro li mortis ?

— En kiu lando li vivis ?

— Kiu estis lia profesio ?

— De kiu grava Esp-organizo li estis prezidanto ?

— De kiu mondskale konata viro li estis amiko ? (li verkis libron pri li).

4 — Jen 5 asertoj. Kiuj estas veraj, kiuj estas mensogaj ?

— La du teatraĵoj prezentitaj en la 1-a Universala Kongreso estis tradukitaj el la franca lingvo.

— La vera nomo de Lanti estis Eugène Adam.

— La Universala Kongreso okazis dufoje en Antverpeno.

— La lasta verko de Valano titoliĝas : « Ĉu rakonti nevole ? ».

— La « maldecaj anekdotoj » de Louis Beaucaire aperis en 1970.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (200 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (400 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (6.00 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (75 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (50 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10e - D ALICANTE - (1 100 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Aurorastraat, 4, 5631 KK EINDHOVEN, pĉk. 209721 (24 gld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bœ Marmarvn 2A Oslo 11 (55 kr.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 20123 (60 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN